

[Eŭropa Bulteno]

MALFERMITA INTERRELIGIA FORUMO EN NITRO

Unu el celoj de la 101-a Universala Kongreso (UK) de Esperanto estis malfermi pere de tri akompanaj malfermitaj fakaj aranĝoj nian movadon kaj niajn universalajn kongresojn al la ekstera mondo.

Unu el ili estis „Mezeŭropa Interreligia Forumo“ (CEIF 2016), kiu okazis lundon la 25-an de julio 2016, kiam okazis en UK programero „Kleriga lundo“. CEIF estis organizita de la Forumo de Mondaj Religioj Slovakio, la Slovaka Esperantista Federacio, la Universitato de Konstanteno Filozofa de Nitra kaj la Fondaĵo Anton Tunega.

Oni povus diri, ke CEIF estis paralela „malfermita kleriga aranĝo“ de UK, kiun partoprenis kiel kredantoj kaj nekredantoj, tiel ankaŭ neesperantistoj kaj esperantistoj. Entute partoprenis ĝin pli ol 150 partoprenantoj el 20 landoj, 3 kontinentoj, 7 mondaj religioj (kristanismo, judaismo, islamo, hinduismo, buddhismo, ŝintoismo kaj bahaismo), aliaj ekleziaj kaj spiritaj tradicioj kaj ateistoj, kiuj diskutis pri aktualaj gravaj temoj kaj defioj de la mondo. Ili komune diskutis en kvar temaj paneloj: migrado kaj integriĝo; malriĉeco kaj malegaleco de enspezoj; paco kaj sekureco; dialogo inter religioj: pri kio? kial? kiel? Fine de CEIF okazis interreligia renkontiĝo en preĝo, kiun partoprenis panelistoj kaj aliaj partoprenantoj de CEIF pere de preĝoj aŭ kantoj kaj siaj ideoj en praktiko „unueco en diverseco“.



CEIF-on partoprenis kiel ĉefa parolanto Ján Figel' (SK), speciala ambasadoro de Eŭropa Unio por religia libereco en la mondo, antaŭ nelonge nomumita de la Eŭropa Komisiono, kiu estas prezidanto de la Fondaĵo Anton Tunega, Bruselo/Bratislava. Dum la solena malfermo de CEIF nome de UEA kaj nia esperantista movado alparolis la partoprenantojn Prof. Humphrey Tonkin (USA), eksa prezidanto de UEA kaj eksa rektoro de Universitato de Hartford, kiu en sia alparolo alte taksis organizadon de la interreligia

forumo kies temoj estas tre aktualaj por la mondo. La celo de CEIF kontribui al interkompreniĝo, respekto, unueco, egalrajteco de homoj kaj aliĝado de la mondo estas sandirektaj kaj similaj kiel agado de UEA kaj Esperanto-movado, kiu klopodas por lingva kaj kultura justeco kaj egalrajteco en interetna komunikado en la mondo. Li invitis partoprenantojn de CEIF viziti kongresejon de la 101-a UK por sperti la etoson de egalrajta komunikado de Esperanto-komunumo en Nitro.

Inter panelistoj de la 4 tempaneloj de CEIF estis ankaŭ 5 esperantistoj: Saeed Ahmed (Pakistano), Katsuya Kimura (Japanio), Flory Witdoeckt (Belgio), Philippe Cousson (Francio) kaj Taesok Choe (Koreio), kiuj havis en paneloj interesajn kontibuaĵojn kaj aktive partoprenis en diskutoj.



Ili prezentis Esperanton dum la malferma internacia aranĝo de la 101-a UK, kiel vivantan, modernan plene funkciantan laborlingvon. Nia lingvo estis unu el 3 laborlingvoj de la Forumo (SK, EO kaj EN). Simultanan interpretadon dum CEIF de/en Esperanto efektivigis je profesia nivelo tri esperantistoj: Marek Blahuš, Marteno Miniĥ kaj

Pavol Petrík, kiujn preparis Lydia Machová (SK), profesia interpretistino kaj esperantistino, por tri paralelaj malfermaj fakaj aranĝoj de la 101-a UK.

La partoprenantoj de CEIF interkonsentis en paneloj kaj diskutoj pri tri gravaj taskoj, ke 1) dialogo estas viva bezono en nuna konfrontita socio kaj vera dialogo devas esti bazita je principo de estimo kaj kono de aliulo, 2) solidareco devas en praktiko esti apogita pere de principo „vivi kaj helpi vivi“, 3) ĉar religio estas ofte vidata kiel fonto de konfliktoj, kredantoj de ĉiuj religiaj tradicioj devas ludi aktivan rolon en publika vivo kaj sentime montri kaj disvastigi bonon.

Tiu ĉi unika kaj sukcesa malferma aranĝo de la 101-a UK organizita kun neesperantitaj organizoj klare montris, ke en estonteco indas organizi similajn malfermajn aranĝojn. Pere de ili ni povos trovi ne nur novajn aliancinojn por kumuna kunlaboro, antaŭenigi komunajn ideojn por paco kaj unuigado de la mondo, kiel koncepton de unu homa familio, sed efike kaj pli vaste malfermi nian movadon al la ekstera mondo kaj prezenti Esperanton, kiel lingvon por konstrui kaj plifortigi pacon en la mondo.

Jozef Reinvar

Sekretario de LKK de la 101-a UK

por eksterlandaj, diplomaciaj kaj fakaj aferoj

LAŬTEMA DEKLARO DE LA

Internacia Konferenco pri Lingvopolitiko: "Perspektivoj de lingva komunikado en EU" Nitra, Slovakio, 28 - 29 julio 2016

La ĉefan dokumenton Deklaro de la Nitra Lingvopolitika konferenco EB aperigis en la pasinta numero, kaj nun ni aperigas pli detalajn klarigojn de la deklaro laŭ tri subtemoj.

Temo 1: *Civitana engaĝiĝo - rimedoj por certigi, ke registaroj kaj EU-institucioj disponigadu informojn pri siaj aktivecoj kaj programoj en larĝa gamo de eŭropaj lingvoj, kaj ke aliro al la institucioj ne privilegiu nur unu aŭ du lingvojn.*

(Aŭtoro: Seán Ó Riain et al.)

Kunteksto

La kreskanta tutmondiĝo kondukas nehaltigeble al la ĉiam kreskanta dominado de nur unu lingvo – la angla. Kvankam la kresko en la uzo de la angla havas multajn pozitivajn trajtojn, ĝi havas ankaŭ gravajn negativajn trajtojn, kiuj estas plejparte ignorataj. Inter ili estas la kreskanta fremdiĝo de EU for de la civitanoj kies lingvoj ne estas uzataj en la EU-institucioj. Multlingvismo estas kerna EU-valoro, ĉar ĝi nepras por certigi ne-diskriminacion en la traktado de EU-civitanoj. Ekzistas ĝeneraliĝinta tendenco, kaj je la EU-nivelo kaj tutmonde, ignori la gravecon de lingvopolitiko. Tio neeviteble kondukas al daŭra fortikigado de la nuna stato – t.e. ĉiam pli granda dominado de la angla je la kosto de ĉiuj aliaj lingvoj, ĉu naciaj, regionaj aŭ minoritataj; kaj al la maljusteco doni dumvivajn nemeritatajn privilegiojn al la 1–2 % de EU-civitanoj (post la Briteliro), kies unua lingvo hazarde estas la angla. La nuna konferenco celas fari paŝon al konsciigo pri lingvopolitiko kiel kerne grava ero por proksimigi eŭropan integriĝon al la civitano. Ĝi celas kuraĝigi EU-n kaj ties membroŝtatojn, kaj aparte la landojn de V4+ kiel eŭropan avangardon, entrepreni konkretajn paŝojn, kiel tion priskribas la tri temaj dokumentoj.

Rekomendoj



1. Eŭropo urĝe bezonas travideblan publikan diskuton pri lingvopolitiko cele al disvolvado de gvidlinioj por EU-aj kaj naciaj lingvopolitikoj, por levi publikan konscion pri la graveco de lingvopolitiko.
2. Dialogo inter ŝlosilaj roluloj en lingvopolitika laboro, politikistoj, ĵurnalistoj, esploristoj kaj reprezentantoj de la civitana socio estas antaŭkondiĉo por pli informita formado de politiko.
3. Kaj la Eŭropa Komisiono kaj la naciaj registaroj devus starigi teamojn de bone kvalifikitaj funkciuloj specialiĝantaj pri lingvopolitiko,

taskitajn integri lingvopolitikon en komercon, kulturon, edukadon, esploradon, la amaskomunikilojn, internaciajn rilatojn kaj en la supernaciajn instituciojn de la EU-sistemo.

4. Unu el la ĉefaj funkcioj de ĉi tiuj lingvopolitikaj fakuloj estus puŝi lingvopolitikojn pli alten en la politika, akademika, eduka kaj amaskomunikila agendoj, kaj certigi ke la lingva faktoro estu eksplicite traktata en ĉiuj rilataj politikaj kampoj kaj en EU kaj nacinivele.
5. Serioza studo devus esti entreprenita de la Komisiono pri la uzo de Esperanto kiel interlingvo aŭ prioritata lingvo en la interna komunikado de EU, kalkulante la ekonomiajn kostojn por lerni la lingvon kaj la longdaŭran ekonomian ŝparon, kiu rezultus el efektivigo de tia sistemo bazita sur Esperanto. Ankaŭ subtenindeco de NRO-aj projektoj en tiu ĉi kampo devus esti esplorita.
6. Devus esti ellaborita Kodo de lingva konduto en EU-institucioj, celanta al egaleco por ĉiuj civitanoj de ĉiuj membroŝtatoj partoprenantaj en la EU-integiĝo, sendepende de iliaj gepatraj lingvoj. La efektivigo de tiu ĉi Kodo devus esti kontrolata fare de la EU-mediaciisto.

7. La EU-institucioj devus disvolvi aktivajn politikojn por kontraŭi lingvan diskriminacion. Dungado devas neniam diskriminacii favore al denaskaj parolantoj de iu ajn lingvo, *ĉu laŭjure ĉu laŭfakte*.

Temo 2: *Multlingveco en la ekonomio kaj socio. Eviti socian ekskludon kaj plifortigi la Internan Merkaton*

(Aŭtoro: Michele Gazzola et al.)

Lingva malegaleco kaŭzas diversajn ekonomiajn kaj sociajn diskriminaciojn, kiuj devus esti kontraŭbatalataj per taŭgaj lingvaj politikoj je la nivelo de EU.

Oni povas identigi kvin esencajn celojn:

1. *Socia inkluzivo.* Instruado de almenaŭ du fremdaj lingvoj en eŭropaj lernejoj kaj/aŭ dumviva lernado estu efektiva de ĉiuj membroŝtatoj. La loka lingvo estu instruata al enmigrintoj, inkluzive de internaciaj studentoj, por antaŭenigi socian inkluzivon.

2. *Rajtoj pri intelekta propraĵo.* EU starigu aron da efikaj kompensaj rimedoj por nuligi lingvorilatajn ekonomiajn malegalaĵojn koncerne protekton de la rajtoj pri intelekta propraĵo ĉe la eŭropa nivelo. La Eŭropa Patenta Oficejo agnoskas nur la anglan, la francan kaj la germanan kiel oficialajn lingvojn, kaj la Eŭropunia Oficejo pri Intelekta Propraĵo nur la anglan, francan, germanan, italan kaj hispanan. Eŭropaj entreprenoj bazitaj en landoj, kie tiuj lingvoj ne estas oficialaj, devas porti altajn tradukkostojn, kiujn la antaŭe menciitaj oficejoj ne plene kompensas, eĉ ne laŭ la nuna regularo de eŭropuniaj unuecaj patentoj. Tio malegaligas la konkurencon inter EU-kompanioj kaj malrespektas la principojn de libereco ene de la Komuna Merkato. Aldone, tio kaŭzas la paradokson, ke protekto de rajtoj pri intelekta propraĵo je la eŭropa nivelo estas malpli kosta por usona aŭ aŭstralia kompanio, ol por portugala aŭ pola.

3. *Konsumantoj.* La Eŭropa Unio protektu la rajton de eŭropuniaj konsumantoj esti informataj en sia denaska lingvo aŭ ĉefa eduklingvo, kiam ili aĉetas havaĵojn kaj servojn. Klera elekto ne eblas, se etiketoj, ingrediencoj, nutraj faktoj, gvidlibroj kaj sekurinstrukcioj ne estas disponeblaj en la denaska lingvo de EU-civitanoj. Multlingvismo estas necesa, por ke la libera merkato efike funkcii. Eŭropuniaj kaj internaciaj traktatoj agnosku la respekton de multlingvismo kiel necesa parto de libera kaj justa komerco.

4. *Ofertalvokoj kaj provizaj procedoj sur EU-nivelo.* La retpaĝoj de la Eŭropa Komisiono estu pli multlingvaj. Tiaj paĝoj enhavas diversajn ofertalvokojn kaj gvidlibrojn pri financaj projektoj de EU, kiuj ofte estas disponeblaj nur en unu lingvo. Tio malegaligas la konkurencon inter eŭropuniaj entreprenoj, NRO-j kaj asocioj, kaj en provizaj procedoj, kiuj kondukas al subskribo de publikaj kontraktoj sur EU-nivelo, kaj en disdivido de la rimedoj, kiuj subtenas transnaciajn projektojn. EU estas financata de eŭropaj impostpagantoj, kaj ĝi ne permesu iun ajn malegalecon en aliro al publika financado.

5. *Eldona industrio.* Uzo de literaturaj indikiloj kaj internaciaj listoj de plej bonaj universitatoj favoraj al la angla lingvo kaŭzas gravajn malegalaĵojn en konkurenco en la eldona sektoro, precipe en akademia eldonado. Tio limigas aliron al scio de EU-civitanoj kaj maljuste avantaĝigas la eldonistojn de kelkaj membroŝtatoj. EU agu por neŭtraligi negativajn faktorojn kaŭzatajn de lingva hegemonio en la eldona industrio per starigo de merkato por lingvaj rajtoj aŭ per subvenciado de plurlingva akademia eldonado. Rimedoj estu kolektataj per lingva imposto al anglalingvaj akademias eldonistoj. Tio estus kohera kun la principoj de la Komuna

Merkato. Aldone, ĝi kontraŭ la uzon de procedoj por taksado de la kvalito de esplorado, kiuj artefarite instigas esploristojn forlasi sian denaskan lingvon en akademia eldonado kaj instruado. EU devus subteni sciencajn publikaĵojn en pluraj lingvoj. Indas esplori la lingvajn konsekvencojn de la Bolonja procedo.



Temo 3: Eduka inkludo - mezuroj por (a) instigi la lernadon kaj uzon de malgrandaj/najbaraj lingvoj; (B) subteni la hejmajn lingvojn de lernantoj, kaj (c) ligi lingvolernadon pli forte al la evoluo de Eŭropa identeco kaj solidareco. (Aŭtoro: Seán Ó Riain et al.)

Kunteksto

La Barcelona Eŭropa Konsilio de 2002 rekomendis, ke ĉiuj EU-civitanoj studu almenaŭ tri lingvojn, la formulo 1+2 (gepatra lingvo plus du). La Raporto al la Eŭropa Komisiono de la Eŭropa Civitan-socia Platformo pri Multlingvismo/ECSPM en 2011¹ raportis, ke la angla estas la unua fremda lingvo lernata fare de la granda plimulto de eŭropaj civitanoj, kaj identigis tiun regadon de la angla kiel kernan faktoron, kiu malfortigas la deziron studi la duan kaj postan fremdan lingvon. La gravecon de lerni la anglan neniu kontestas, sed la ordo, en kiu lingvoj estas lernataj, ege gravas. Fremdlingva instruado ne donas la atendatajn rezultojn. Kvankam multaj kredas, ke la kono de la angla kiel la unua fremda lingvo disvastiĝas, Eurobarometer montras, ke en 2005-2011 en la tuta EU, la elcentaĵo de tiuj, kiu asertas paroli fremdan lingvon, fakte malkreskis de 56% al 54%. Tiuj, kiuj asertas, ke ili parolas duan fremdan lingvon, malkreskis de 28% al 25%². Por SurveyLang 2012³ la testado de lingvokono okazis nur ĝis la B2-nivelo, ĉar tiuj, kiuj atingas la C1-nivelon, kreas etan minoritaton, je la ordo de 1%. Klaras, ke ekzistas spaco por plibonigi la lingvolernadon. Ekzistas ankaŭ bezono evoluigi komunan elementon en la edukado de eŭropaj civitanoj, por ilustru la kontribuon de eŭropa integriĝo al paco.

Strategio por plibonigi la lingvolernadon

La unua rekomendo de ECSPM en la edukada sekcio estas jena: *la Platformo rekomendas empirian esploron en bazlernejoj en kelkaj membroŝtatoj por konstati, kiu unua fremda lingvo plej verŝajne kuraĝigos la sekvan lingvolernadon kaj ankaŭ kontribuos al la prioritato de EU Eŭropo 2020 "redukti la nombron de tiuj, kiuj tro frue forlasas la lernejon, al 10% de la nunaj 15%" (sekcio 3.1).* La celo estas testi la rezultojn de lernado de la dua fremda lingvo tie, kie la unua fremda lingvo instruata en lernejoj estas la angla, la franca ks. Estas ĝenerale akceptate, ke la iu ajn dua lernita lingvo helpas sekvan lingvolernadon. Tio estas la *propedeŭtika efiko*. Ĉar la instrutempo en lernejoj malmultas, estas sencohave uzi la tempon dediĉatan al lingvolernado kiom eble plej bone. Mem la lingvo uzata por propedeŭtikaj celoj estas malpli grava ol la fakto, ke ĝia strukturo devas sproni al rapida kaj facila lernebleco, tiel pliigante la motiviĝon por posta lingvostudado. Ekzemple, *lingvo-orientiĝa kurso*, kiu daŭras 50-100 horojn, enhavante la bazan gramatikon de Esperanto kaj la 500 plej ofte uzatajn radikojn, jam donis interesajn rezultojn en Britio⁴ kaj aliloke, kiel priskribis profesoro Renato Corsetti⁵. Ĝi devus tial esti parto de la supre menciitaj testoj, kiujn rekomendas ECSPM.

Rekomendo

1 ec.europa.eu/languages/pdf/civilsocplrapport-full-version_en.pdf, p 9. La ECSPM konsistas el 29 tuteŭropaj organizaĵoj kaj retejoj.

2
3
4
5

La Nitra Konferenco do rekomendas la efektivigon de la supremenciita rekomendo de ECSPM en kelkaj **bazlernejoj en la landoj de Visegrad 4+**, por testi objekte, kiu unua fremda lingvo plej efike plibonigas la postan lingvolernadon; kaj komencan laboron por evoluigi proponatan komunan edukatan elementon, por ilustri la kontribuon de eŭropa integriĝo al paco.

EU-POLITIKO 'UNULINGVA' KURAĜIGUS ELITISMON KAJ PLEJ FORTE TRAFUS LA MALPLEJ AVANTAĜITAJN

*En pli kaj pli angla-centreca mondo, ĉu multlingveco ankoraŭ bezonatas en Eŭropa Unio? La respondo estas laŭtege "jes", laŭ studo de **Michele Gazzola**. Analizinte donitaĵojn de Eurostat, li eltrovis ke se la angla iĝus la ununura oficiala lingvo de EU, tio ekskludus proksimume kvar el kvin EU-civitanojn de profunda kompreno de oficialaj informoj. Tio-ĉi siavice plifortigus malegalecon en la aliro al adjudikoj (juro en kiu juĝisto decidas pri proprajtoj) de EU, kaj verŝajne plie stimulus eŭroskeptikecon. Li argumentas ke 0,0087% el la malneta enlanda produkto (MEP) de EU kiuj investiĝas en multlingvecon estas prezo tute paginda por certigi lingvan inkluzivecon.*

Dum parolado al la Europa Parlamento farita la 26an de oktobro 2004, Ŝia Majesto la Reĝino de Nederlando diris:

"Se ni devus nomi ion kio plej intime estas nia, ni verŝajne dirus ke tio estas nia denaska lingvo. Ĉiu membroŝtato laŭe donas grandan gravecon al la agnosko de sia lingvo en Eŭropa Unio. Tial mi hodiaŭ alparolas vin en la nederlanda lingvo. Samtempe, mi estas konvinkita ke kunlaboro en Eŭropo postulos de ni pli kaj pli da koncedoj en tiu-ĉi kampo. Se ni ne volas transformi Eŭropan Union en "Babelan turon", ni devos fari ĉian klopodon por kompreni unu la alian tiom klare kiom eblas."



En la pasintaj jaroj, aro da observantoj argumentis ke EU devus finfine agnoski la rolon de la angla kiel eŭropa interlingvo - "kapti la taŭron je la kornoj", kaj igi la anglan la ununura oficiala lingvo de EU. Malpli radikalaj komentintoj argumentis favore al trilingveco surbaze de la angla, la franca kaj la germana.

Tiu propono tamen ne estas senproblema. Anstataŭigo de la 24 oficialaj lingvoj de EU per nur la

angla aŭ per tri lingvoj (angla, franca kaj germana) ne nur malavantaĝigus la civitanojn de kelkaj Eŭropaj landoj pli ol aliajn; ĝi ankaŭ malfavore trafus ekonomie kaj socie malavantaĝitajn individuojn, kaj per tio pligrandigus la distancon inter la institucioj de EU kaj ĝiaj civitanoj.

La rezultoj de antaŭnelonge farita studo:

[<http://eup.sagepub.com/content/early/2016/07/28/1465116516657672.abstract>] kontraŭdiras

la ideon ke malpliigi la oficialajn lingvojn de EU estus pli efika kaj inkluziva. Uzante la donitaĵojn kolektitajn fare de Eurostat pri preskaŭ 170.000 loĝantoj kaj ties lingvoscioj en 25 EU-landoj, la artikolo elmontras ke se la angla estus la nura oficiala lingvo de la Unio, 45% de la logxantoj en la ekzamenitaj landoj ne havus aliron al leĝaj dokumentoj, al retpaĝoj de EU-institucioj kaj al la debatoj farataj en la Eŭropa Parlamento kaj elsendataj rete, ĉar ili ne komprenas tiun lingvon. Alivorte, ili estus lingve ekskluditaj, kaj tion eblas kompreni kiel formon de lingva ekskludo.

Tamen povas esti riska afero konsideri samnivelaj denaskajn parolantojn de iu lingvo kaj homojn kun nur bonetaj aŭ meznivelaj lingvokonoj. Rigardante EU-loĝantojn kiuj estas nek denaskuloj nek fluaj parolantoj de la angla, la proporcio de loĝantoj kiuj havus malfacilojn kompreni politikajn kaj leĝajn EU-dokumentojn kreskas al 79%. Kvar el kvin eŭropanoj. Do, malkiel oni ofte kredas, flua rego de la angla ne estas baza scio en Eŭropo, eĉ ne inter la pli junaj plenkreskuloj.

Nur 30% de la respondintoj 25- ĝis 34-jaraĝaj havas neniun konon de la angla, kio estas malpli ol la averaĝo (45%), sed 74% de la respondintoj en tiu aĝogrupa ne parolas la anglan je flua aŭ denaska nivelo. Tiu-ĉi valoro estas sufiĉe proksima al la averaĝo por la tuta loĝantaro (79%). Alivorte, la junuloj pli versxajne parolas fremdajn lingvojn ol la pli aĝa generacio, sed ili regas ilin apenaŭ pli bone. Tiu ĉi rezulto kongruas kun la antaŭnelongaj rezultoj de Eŭropa studo pri lingvaj kompetentoj [<http://www.surveylang.org/>] de lernejoj. Lingvopolitiko bazita sur la angla, franca kaj germana ankaŭ estus treege ekskluda, ĉar ĝi ekskludos 26% gxis 49% de la loĝantaro, depende de la uzita indikato, kaj tiuj procentaĵoj konsiderinde kreskus post kiam Britio forlasos Eŭropan Union.



hejmo.

Tio tamen ne estas la fino de la rakonto. Multlingveco estas ne nur la plej efika politiko por transdoni informojn pri EU al eŭropanoj. Ĝi ankaŭ estas la nura kiu estas vere inkluziva je relative racia kosto (0,0087% de la malneta enlanda produkto (MEP), 1% de la bugxeto de la institucioj kaj agentejoj de EU). Drasta malpliigo de la oficialaj lingvoj de EU havus regresigan efikon, ĉar tio aparte malfaciligus la aliron al informoj publikigitaj de EU por la malplej edukitaj homoj, por tiuj kun la plej malalta salajrostato, por la senlaboruloj, por la pensiitoj, por la longdaŭre handikapitaj homoj kaj por la loĝantoj kiuj plenumas taskojn en sia

Ekzemple, 17% de la respondintoj kiuj sukcese finis trianivelan edukadon (t.e. universitan aŭ similan) havas ajnan konon de la angla, dum tiu procentaĵo estas je 47% inter tiuj kiuj atingis nur supran duanivelan edukadon 21% de la respondintoj kun laborposteno ne havas konon de la angla, franca aŭ germana, ĉu kiel fremda aŭ kiel denaska lingvo, sed inter la senlaboruloj tiu procentaĵo estas 41%. Loĝantoj kun relative pli alta monenspezo pli verŝajne parolas fremdajn lingvojn ol tiuj kiuj havas relative pli malaltan enspezon kaj tial estas malpli verŝajne ke ili estus lingve ekskluditaj se EU ĉesus uzi ilian denaskan lingvon aŭ ĉefan edukan lingvon.

Ne estas nur rekta malpliigo de la lingvokvanto kiu estus ekskludiga. Eĉ malpliigo de la aktualaj uzokampoj de la oficiala lingvo kaŭzas similajn efikojn. En 2014, ekzemple, 14 Ĝeneralaj Direkcioj (ĜDoj) de la Eŭropa Komisiono el 33 publikigis siajn hejmpaĝojn nur en

la angla, ok ĜDoj publikigis ilin en la angla, franca kaj germana, unu ĜD en 11 lingvoj, kaj 10 ĜDoj en 24 aux 23 oficialaj lingvoj. Tiuj-ĉi hejmpaĝoj ofte enhavas materialojn kun strategia graveco por ekonomiaj agantoj kiel ekzemple malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj, asocioj kaj neregistaraj organizoj kiuj konkurencas pri adjudikoj, subvenciaj programoj aŭ aĉetaj proceduroj. Rezulte, konkurenco inter tiaj agantoj povas montriĝi malekvilibra pro manko de adekvataj multlingvaj informoj.

Tradukado kaj interpretado estas multe pli bonaj manieroj por konstrui socian koherecon en EU, ĉar tio permesas al ili partopreni en ĉiuj sociaj procedoj. Kontraŭe, lingvopolitiko en la stilo de la deknaŭa jarcento, "unu ŝtato, unu lingvo", ekskludus tro da eŭropanoj el eŭropunia negocado, kaj malproporcie trafus la malplej avantaĝitajn homojn. Eble neniam estis tiom urĝa kiel nun por EU esti proksima al siaj civitanoj per uzo de iliaj gepatraj lingvoj, kaj malhelpi plian nutradon de eŭroskeptikaj movadoj. Eviti la elitisman tenton tial havas decidan gravecon, inkluzive en la kampo de lingvopolitiko.

Michele Gazzola

(tradukis Sandra Schweder el:

[A 'one-language' EU policy would foster elitism and hit disproportionately the least advantaged](#))

83-a ITALA KONGRESO: SE VI NE EBRIĜAS PRO LA ETOSO, LA SUNO, LA ARTO, VI POVAS TAMEN EBRIIĜI PER VINO



Ĉi tiu foto estas farita ne en IJK, sed en Itala Kongreso de Esperanto!

Frascati (Fraskati) estas la nomo de la urbeteto, en kiu okazis la 83a Itala Kongreso de Esperanto. Ĝi estas konata en la mondo ĉefe pro sia vino, kiu ricevis la honoran klasifikon, "DOC = Ni kontrolis, ke ĝi vere venas de tie", post longa lukto kontraŭ la Eŭropa Unio, kiu unuadecide volis, ke ĉiuj eŭropaj vinoj estu egalaj – kaj tiu de Fraskati kaj

tiu ĥemie produktita en norda Svedujo. Do, ĉiuj konas Fraskati-on pro la vino kaj neniu scias, ke ĝia antaŭa versio, Tusculum, estis urbo tre fama kaj potenca antaŭ ol Romo mem, ĉi tiuj novriĉuloj, ekestis. Neniu en la mondo scias, ke tie oni donacas al vi pogrando katedralojn kaj nobelajn vilaojn de la pasintaj jarcentoj. Tamen la 230 kongresanoj el dudeko da landoj el kvar kontinentoj nun scias tion.

Ili ĉeestis la inaŭguron kaj tre bonedukite ne montris eksterajn signojn de dormo kaj aplaŭdis, kiam estis la momento por aplaŭdoj. Post la saluto de la lokaj instancoj sekvis la festparolado de Humphrey Tonkin, kiel kutime emociiga kaj "instiga al la soldatoj", kiel oni diris pri la paroladoj de Lapenna. La vera emocio, tamen, kiel kutime eksplodis kiam salutis la kvar kontinentoj kaj deko da fakaj asocioj.

Sekvis ekde la 20a ĝis la 27a de aŭgusto semajno plena je kulturo. Kristin Tytgat debatis pri lingvoj en EU, kaj vi povas imagi la intervenojn de la esperantista publiko pri tiuj malbonuloj en Bruselo, kiuj ne dormas dum la nokto por eltrovi novajn manierojn puŝi la anglan. Tre pli sobraj estis la teĥnikaj diskutoj en la dua seminario pri instrumentadoj, gvidata de Katalin Kováts.

Jam en la sabato oni aranĝis sciencan tagon pri Esperanto kaj minoritataj lingvoj en prestiĝa salono de la urbodomo, en kiu parolis italaj kaj eksterlandaj lingvistoj pri minoritatoj kaj ties rajtoj. Cetere iu kuraĝis aserti, ke la itala jam estas minoritata lingvo en Eŭropo kaj en la mondo. Tiu debato havis sekvon en la kongresejo dum la posta lundo, kie kelkaj neesperantistaj lingvistoj malsuprenis al la nesto de la leonoj por debati kun esperantistoj. Multenombra gardistaro permesis al ili eliri sen fizikaj sekvoj, sed ne estas tre konsilinde aranĝi tiajn renkontiĝojn, se oni ne povas protekti la gastojn.

Multaj kongresanoj ebriiĝis pro la etoso de italaj Esperanto-kongresoj, kie leciono pri ventrodancado apudas prelegon pri la vojo de zingibro de Azio al Eŭropo, kun tro detala klarigo pri la araba radiko “zanĝ-”, kaj kie la libroservo provas konkurenci kun tiu de UEA.



83a
ITALA KONGRESO
DE ESPERANTO
FRASCATI (ROMA)

20a-27a
aŭgusto 2016



Multaj aliaj ebriiĝis pri la antaŭ-romaj urbetoj de tiu regiono, kiu ankoraŭ konservas siajn antaŭ-romajn muregojn. Ili, cetere, inventis la vorton “latina” kiel specon de insulto al tiuj homoj, kiuj loĝis ne sur montetoj sed en la ebenaĵo.

Kompreneble la maro kaj la antikvaĵoj de Ostia, la haveno de Romo, ankaŭ kontribuis al la ebriiĝo.

Multegaj aliaj ebriiĝis pro la Papo. Ĉi tiu Papo ŝajnas la estro de la gerilanoj de Ĉe Gevara pro la enhavo de liaj paroladoj, kaj samtempe la ŝafido de Dio, kiu aparte akceptas kaj salutas ankaŭ la esperantistojn en Romo, en la placo Sankta Petro, konstruita ĝuste por doni senton de neeltenebla impresio al la mezepokaj pilgrimoj.

Fine restis la vino, kiu en Fraskati estas tre malmultekosta, kaj la italaj manĝoj kaj la popolaj dancoj en la ĉefa placo de la vilaĝo la lastan vesperon. Ĉiuj ŝatas Beethoven kaj Chopin, sed la popolaj dancoj de suda Italujo estas io alia ankaŭ por ŝatantoj de klasika ĉambra muziko.

Niaj 230 gastoj reiris hejmen sub tre arda suno kaj certe pretas reveni la venontan jaron. En 2017 ni proponos mediteranean kongreson en la suda fino de Italujo, Herakleo, en la vilaĝo de Policoro (Polikoro), en la provinco de Matera. Se vi venos tien, vi povos diskuti kun la heredantoj de la greka kulturo

(Suda Italujo estis en la antikveco la dua Grekujo) pri la radikoj de la eŭropa kulturo kaj kial oni devas konservi ilin, se oni volas civilizitan Eŭropon, kiu ankoraŭ kapablos diri ion al la mondo. Se la greka kulturo tudas vin, ne gravas. Ni estas tie ĉeege ĉe la maro, kaj vi scias, kion vi povos fari. La 84a Itala Kongreso de Esperanto senerare sekvos la 83an, ankaŭ ĉar en tiu regiono vivis Pitagoro, kiu inventis matematikon.

Renato Corsetti

LA PARTIO »UNU MONDO« EN DISTRIKTAJ BALOTOJ

La partio Unu Mondo (Eine-Welt-Partei, mallonge EINE WELT), fondita en 2010 de 7 esperantistoj kaj unu neesperantisto, partoprenis en la distrikta balotoj (Kreiswahl) de Lüneburg la 11-an de septembro 2016. La rezulto estas kuraĝiga: Tie, kie ĝi havis kandidatojn - t.e. en la tuta urbo Lüneburg kaj du apudaj komunumoj - ĝi akiris entute 1,32 % de la voĉoj.

Ĉar mankis kandidatoj en 3 el la 7 balotregionoj, la rezulto por la tuta distrikto (kun 181.000 loĝantoj) malaltiĝis al 0,72 %.

Tiel nur per malmultaj voĉoj kaj pro malbonŝanco UNU MONDO maltrafis seĝon en la distrikta parlamento (Kreistag). La akiritaj voĉoj eĉ sufiĉus por unu seĝo, se ekzemple 48 voĉdonantoj por socialdemokratoj estus elektintaj kristandemokratojn. Same sufiĉus, se 36



ne-voĉdonintoj estus elektintaj UNU MONDO.

Kvankam la grupon de UNU MONDO en Lüneburg kreis nesperantistoj, la anoj emfazis en siaj informiloj, ke la partio estiĝis el la Esperanto-movado. En sia postbalota dankletero ili skribis: "Ni volas fondi esperantan grupon, kiu lernas tiun lingvon, kiu simbolas facilecon, kompreniĝon kaj pacon."

La rezulto en Lüneburg estas kuraĝiga por la Eŭropaj Balotoj 2019, ĉar tie sufiĉos, almenaŭ laŭ nuna jura stato, jam ĉ. 0,5 % de la voĉoj por ekhavi deputiton en la Eŭropa Parlamento -

kiu tiam plej verŝajne estus esperantisto.

La 29-an kaj 30-an de oktobro 2016 pli ol 10 esperantistaj kaj nesperantistaj aktivuloj de UNU MONDO kunvenos en Lüneburg por diskuti kaj decidi pri la plua vojo de la partio. Dum en la partio regas unuanuimeco pri sloganoj kiel "Surloke kaj tutmonde - juste, paceme kaj respektplene", la Lüneburg-a grupo inklina al maldekstraj pozicioj (kaj ankaŭ al malfermaj limoj kaj la t.n. "bonveniga politiko"), dum ene de la partio troviĝas ankaŭ pli konservativaj pozicioj; ĝi origine celis esti partio de la politika mezo. Fine jen ligilo al la precizaj rezultoj de la baloto. [Wahlergebnisse](#)

Ulrich Matthias

LA 15-a NOVJARA RENKONTIĜO (NR)

Fine de la jaro, de la 27-a de decembro 2016 ĝis la 3-a de januaro 2017, okazos en Saarbrücken, apud la franc-germana landlimo, kun programo por junuloj, la 8-a Novjara Internacia Semajno (NIS).

Ni invitas vin sperti kun ni la internacian etoson, la kunestadon de infanoj, junuloj, mezaĝuloj kaj maljunuloj, la ampleksan programon de prelegoj kaj kursoj, infana programo, vesperaj programeroj, iom da promenoj kaj ekskursoj kaj festi kun ni la novan jaron dum la silvestra nokto.



Kelkajn impresojn de partoprenintoj en la pasintjara NR kaj korusan kanton vi trovos en filmeto ĉe Youtube <https://www.youtube.com/watch?v=9fReKGGQ8xg>

Intertempe aliĝis jam 109 homoj - multajn nomojn vi trovos sur

http://www.esperantoland.org/nr/partoprenantoj_nr15.php

kaj http://www.esperantoland.org/nis/partoprenantoj_nis8.php

Estas bela internacia miksaĵo - du trionoj de la partoprenantoj venas el eksterlando, el pli ol dekduo da landoj. Aliĝis ĝis nun 37 infanoj kaj junuloj - do eble ne atendu plenan trankvilecon dum NR...

La limdato por la aktuala aliĝperiodo de NR estas la 15-a de septembro. Se vi do ŝatos partopreni en NR, eble konsideru baldaŭ aliĝi - aŭ almenaŭ informi nin pri via intereso.

<http://www.esperantoland.org/nr/alighilo.shtml#alighilo> Se vi havas iujn demandojn pri NR kaj NIS, mi volonte provos respondi al vi.

Lu Wunsch-Rolshoven

DENIS KEEFE DUM »AŬTUNE« EN GRESILLON

Pluraj Esperanto-kursoj kaj multaj interesaj aktivaĵoj, programo por viaj gefiloj kaj genepoj dum la francaj lernejoj ferioj de lundo **24a de oktobro** ĝis mardo **1a de novembro**, en kastelo Greziljono.

Super-BEK-on gvidos **Dennis Keefe**, subtekst-tradukadon **Sergo Sire**.

Vidu detale en gresillon.org/autune

Bert Schuman

RAPORTO EL POZNAN (SEPTEMBRO 2016)

La ĉi-septembra interlingvistika sesio (17-23.09.2016) estis jam la 5a por la gestudentoj, kiuj antaŭ du jaroj komencis siajn postdiplomajn studojn en kadre de la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz. 17 persistaj partoprenantoj (5 el Brazilo, po 3 el Hispanio kaj Pollando, po 1 el Svedio, Serbio, Ĉeĥio, Rusio, Kroatio kaj Belgio) atingis la trian jaron de siaj studoj, kiam okazas specialiĝoj. Ĉi-foje – pro la granda nombro de studentoj – povis okazi eĉ 4 specialiĝoj: pri esperanta lingvistiko, esperanta literaturo, internacia kaj interkultura komunikado.

La kvara, la specialiĝo pri instruado de Esperanto donis eblecon alorganizi grandan aldonan grupon da instruista trejnado: 18 personoj el 12 landoj decidis perfektigi pri instruado de

Esperanto, krom la 3 el la interlingvistikaj gestudentoj. La programon gvidis d-ino Katalin Kováts kun granda kompetento kaj elano, kontribuis Zsófia Kóródy kaj prof. Ilona Koutny, pri movadhistorio d-ro Ulrich Lins. La partoprenantoj ekkonis interalie diversajn instrumentojn, instruilojn kaj internaciajn kunlaboreblojn, spertiĝis pri la pretigo de fonetikaj, gramatikaj, leksikaj kaj komunikaj ekzercoj... Salutis en la nomo de UEA kaj gastprelegis pri la taskoj de la Jaro de lernanto Stefan MacGill, vizprezidanto de UEA. István Ertl prezentis la nuntempan Esperanto-literaturon por ĉiuj partoprenantoj kaj prof. Probal Dasgupta la azian kontribuon al literaturo. István Ertl kaj Tomasz Chmielik enkondukis la partoprenantojn de la literatura specialiĝo en la sekretojn de beletra tradukado, Probal Dasgupta analizis kun ili verkojn de aziaj aŭtoroj. Li gvidis kurson ankaŭ por tiuj kiuj elektis la lingvistikan specialiĝon, krome li prelegis anglalingve por kolegoj el la Novfilologia Fakultato. Prof. Zbigniew Galor traktis sociologiajn aspektojn de komunikado, interalie ankaŭ esplormetodologion kaj Ilona Koutny la lingvajn aspektojn. Kontribuis al la programo Barbara Pietrzak per esperanta radiofonio kaj Roman Dobrzyński pri spertoj en filmfarado kaj ĝia aplikado en instruado.



La sesio pasis en tre bona kaj internacia etoso (spektu la filmraportojn de Katalin Kováts elirante el edukado.net <http://edukado.net/novajhoj?id=646>). La komuna vespero ebligis artan prezenton de la partoprenantoj (ekz. Suso Moinhos prezentis sian novan poemaron, Anna Bartek kantis). La semajnon fermis la kultura festivalo Arkones (23-25.09: <http://arkones.org>, kie la gestudentoj prezentis sin) kun multaj interesaj programeroj, parte kompletigante la temojn de la studoj. Okazis memorkunsido dediĉita al du elstaraj esperantistoj mortintaj en tiu ĉi jaro: Michel Duc Goninaz kaj Detlev Blanke, kiuj kontribuis al la Interlingvistikaj Studoj (<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/stabo.html>).

Ilona Koutny

Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

(Redaktora aldono de EDUKADO.NET: la grandnombran partoprenon de interlingvistikaj studentoj multe helpis la malavara subvencio de ESF kaj ĝia kampanjo [AMU Poznanon](#), la [monkolekta kampanjo de edukado.net](#) kaj kvin partoprenantojn de la unujara instruista trejnadado mone subvencio ILEI.)

INTERNACIISMA RENKONTIĜO EN FIGUERES

Provizora programo:

- Enkonduka kurso de Esperanto

Gvidata de Pedro M. Martín Burutxaga, la kurso daŭros la tutan semajnfino

- PRELEGOJ / ATELIEROJ

— Klarigoj en la mallumo / Aclariments sobre la foscor

Paquita Garcia kaj Teresa Marbà gvidos dulingvan kaj duhoran atelieron kiu enkondukos la partoprenantojn en la mondon de la blinduloj por mem-sperti kaj kompreni la malfacilaĵojn kaj la bezonojn de la blindaj homoj.

Estas tre grave, ke partoprenantoj anoncu sin antaŭ la 26a de oktobro, por ke oni pretigu ties nomojn laŭ la skribsistemo Braille.

— “16a jarcento: unu internacia lingvo por la tuta Hispana Krono”

prelego de Lluís Batlle pri la planado de la hispana lingvo en la 16a jarcento

— “Muzikaj efektoj 2”

Post la sukceso de la prelego de Viktoro Solé pri muzikaj efektoj, la muzikisto prezentos al ni pliajn efektojn uzatajn de la komponistoj

— “Volontulad-ebloj por junuloj”

Manuela Burghilea proponas inform-atelieron pri la volontulad-eblecoj por Esperanto (franca civita servado, Eŭropa volotula programo), surbaze de sia sperto en Tuluzo.



— “Paca agado kontraŭ apartismo kaj rasismo en Palestino”

Mateu Vic gvidos inform-atelieron pri la situacio en Palestino kaj la diversajn pacajn iniciatojn kaj la internacian agadon.

— Historio de EUROKKA kaj Vinilkosmo

Floréal Martorell proponas

prezenton per lumbildaro pri kronologia historio de EUROKKA kaj Vinilkosmo kaj de ilia evoluo dum la 28 jaroj de ekzisto por EUROKKA kaj 26 por Vinilkosmo..

KONCERTO/BALO

— Tradiciaj dancoj tutmondaj

Vendrede la dancigisto Mon Cardona enkondukos, ludos kaj dancigos tutmondajn tradiciajn dancojn

— JoMo

Sabate, la fama okcitana esperanto-kantisto prezentos sian lastan spektaklon

EKSKURSOJ

— Muzeo Dalí

Vizito al la muzeo de la fama superrealisma artisto. Krompago 3 eŭroj

— Kastelo Sant Ferran

Vizito al la enorma 18-jarcenta kastelo Sant Ferran.

Ferriol Macip i Bonet

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de septembro 2016

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Jozefo Reinvar, Miĉele Gazzola, Renato Corsetti, Ulrich Matthias, Lu Wunsch-Rolšoven, Bert Schuman, Ilona Koutny, Ferriol Macip i Bonet

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

